

BABILONAJ TUROJ DEVAS FALI

Rifuzado de Kristo fariĝas turmento de la nuntempo

Ĉu ni tiel daŭrigos? Jes, ni tiel daŭrigos. Ni faros iujn korektojn, pliseverigos iujn sekurecajn normojn, sed en la granda kaj la tuto ni daŭrigos kiel ĝis nun. Eĉ post japania katastrofo ni daŭrigos, ĉar ni estas kapablaj fari neniujn gravajn ŝanĝojn, ni trovas neniujn alternativojn. Eble kelkajn atomelektrejojn ni malfunkciigos, anstataŭos ilin per nova energispeco, ion ni plirapidigos, kaj poste ni plu veturos per plena gaso kiel ĝis nun. (El eseo de F. Kronbeck)

Ĉe ĉio tio, kio sin preparas nin superŝuti, ne temas pri certa eventuale teknika aranĝo por antaŭevito de plago. Kion ni nuntempe devas travivadi, estas nekomprenebla abismo, jes, la mortiga peko kontraŭ Dio.

Kiel nin instruas la kredo, la malbono konsistas en misuzo de la libereco (fare de anĝelo aŭ la homo). La malbono venis en la mondon, ĉar unu el la anĝeloj volis esti kiel Dio. Li volis similecon, kiun al li difinis Dio, plialtigi per la maniero, kiun la Dio ne koncedis. Tomaso de Akvino diras: „Li volis fari kiel celon de sia strebado beatecon, kiun li povas atingi per fortoj de sia propra natureco, kaj li sin tiel deturnis de la supernatura beateco, kiu rezultas nur el Dia graco. Tiel la fiereco fariĝis bazo de ĉiuj pekoj.“ (STh I, q. 63, a. 3).

Ni povas uzi la saman citaĵon, ĉar ankaŭ en ni estas la sama sopiro: La anĝeloj estas en forto de sia sciado senlime pli sublimaj, sed ili estas same kiel ni provizitaj kiel spiritaj estuloj per libera volo. Ĝuste tiu ĉi libereco de la volo ebligas voli ion alian ol Dio, aŭ voli tion alimaniere. Surbaze de tiu ĉi fiereco la diablo opiniis, ke li ne bezonas atendi la gracon de Dio, por rigardi al Dio, sed ke li tion povas fari propraforte.

Kaj efektive. Ju pli altaj estas intelektaj kapablecoj, des pli grandaj ekzistas tentoj al la fiereco. Ĉar la racio en certa grado – kiel ĉe la anĝelo – povas pensi pri ĉio, kio li estas, li konstante estas tentanta sin proklami kiel principon de ĉiu realeco kaj kiel mezuron de ĉiuj objektoj, postuli sian regadon super ĉio. La intelektuala fiereco starigas kreitan, limigitan racion super Dion, Kiu la veron ne

posedas, ĉar ĝi estas la vero.

Komploto de ĉiuj komplotoj

Kaj el tiu ĉi elirsolvo, sur la precize sama loko kiel la anĝelo, povas la homo subiĝi al la tento de la Satano fariĝi mezurilo de ĉiuj aferoj kaj arbitro difini, kio estas bona kaj kio malbona. Tiel eniras en la mondon treega rompo: la homo sin forŝiris de Dio havanta antaŭ si la mondon, kvazaŭ Dio ne ekzistus, vidanta ĉiujn aferojn, kiaj ili estus, se Dio ne ekzistus.

Sed ĉar sen Dio nenia estado ekzistas, sen Dio estas ĉio nenio. Tiel ricevas Nenieco – Malbono tiun aspekton, ke la homo stariĝas ekster Dion, eventuale kontraŭ Dio ion propran.

Tiel la homo sin ĉiam pli enplektiĝas en la neniecon kaj malbonon, ĝis por li la malbono iĝas realeco, ĝis li volas ion starigi kontraŭ Dio. Ekde tiu tempo la homo devas vivi en la mondo, kiu estas markita per malsanoj, morto, sufero, maljusteco, katastrofoj, kaosoj, trompoj kaj mensogoj. La homo enportis en la mondon malbonon, super kiu li volis estis mastro, pli ĝuste dirite, li kaŭzis kaj kaŭzas ĝin. Li submetis sin tiel sub la fortojn, kiuj ne havas alian sencon ol malami Dion kaj kiuj malamas ĉion, kio rilatas al enkarniĝo kaj la sava ofero de Dio ĝis tiu grado, ke li malamas ankaŭ virginecan Patrino de Dio Maria-n kiel virinon, kaj antaŭ ĉio ŝian patrinecon. Nur tiel estas por ni komprenebla, kial al la murdanto de la homaro ekde la komenco tiom gravas tio, por ke li kiom eble plej multe povu verŝi la sangon de la senkulpaj infanoj.

Ĉiu malbono en la mondo sin devenigas de la peko de diablo; li inokulis la homon al tio, ekribeli sammaniere kiel li kontraŭ Dio.

Tio estas unusola komplota teorio, kiun ni devas akcepti, ĉar ĝi eksplikas, kial ekzistas komplotoj (da ili estas plena historio), kaj samtempe, kial realiĝas tiom da malbono eĉ sen koncerna komploto: el malsaĝeco kaj ideologia blindeco kunigitaj kun la fiereco, envio, malamo kaj kolero. Ĉiu pekulo estas partoprenanto de tiu ĉi komploto.

Kio sekvas post rifuzo de Kristo

Kaj tamen: la jugo, al kiu sin subigis la homo per la peko, estis rompita. La Dio forigis enplektiĝon en malbonon, por la homo mem nesuperantan, kaj ĝiajn sekvojn, kaj renovigis lian eblecon sin apogi ne per la propraj fortoj, sed per la Dia graco. La Dio siamaniere enmetis en la mondon, kiu per la peko falis en kaoson, denove la semon de la ĉiela ordo, laŭ kiu distingiĝas la spiritoj kaj pere de kiuj denove komencas regado de Kristo super la mondo.

La homa historio estas batalareno, kie kolizias tiuj fortoj: la Vorto, kiu eniris en la tempon kaj kiu plu efikas pere de Eklezio kaj la Sankta Spirito, kaj la fortoj, kiuj distingiĝas per tio, ke ili rifuzas Kriston kaj batalas kontraŭ ĉio, kio estas de Kristo. Tiel komencis jam ekde la Pentekosto dum fondo de la Eklezio pereiga batalo kontraŭ ĝi. Post martireco de la sankta Stefano sekvis morto de pluaj apostoloj... ĝis la martireco en la dudeka jarcento, kiu signifis danke al komunismo morton de pli alta nombro da martiroj ol en ĉiuj ĝisnunaj jarcentoj entute. Kaj pri tiu amasigo de la kristana martireco ne eblas kulpigi nur individualan malamikecon – ne, ĝi estas pli ofte esprimo de ĝenerala rifuzado de Kristo kaj la ordo, kiu koheras kun lia graco.

Montriĝas konstante la sama bildo: la homo elpensas por si manierojn de mempereigo, en kiuj li opinias, ke eĉ sen Kristo li havas partoprenon en Dio kaj povas atingi

paradizon ekster Golgota. Kaj ĝuste tiel li ripetante aktualigas per ĉiuj eblaj manieroj la pekon de Lucifero.

Kaj tial ne rajtas la kritikemaj spiritoj de la modernismo riproĉi al la kristanoj, ke ili havas alian, pli profundan prijuĝon de la evoluo de la lastaj jarcentoj, ol la mem-elektitaj eguloj de la spirito ekde la tempoj de iluminismo: Ekde la tempoj, kiam estis sankta Jakobo ĵetita el templa krenelaro en Jerusalemo kaj tiel mortigita, kuniĝas la kontraŭkristanaj fortoj ĉiam pli multe por surtronigi la mondon, por kiu principo de la ekzistado ne estas la enkarniĝinta Vorto kaj lia ordo, sed la mondo, kiu sin apogas sur nenio alia ol sur la rifuzado de Kristo. Kiu rifuzas Kriston, sin starigas kontraŭ Dio kaj ne amas la lumon, sed mallumon (komp. Joh 3,19).

Okazis tio pere de komploto kaj plu tiel okazas pere de komploto – kiu tion ne volas scii, neniam li okupiĝis pli profunde pri historio kaj politiko – sed tiel okazadas ankaŭ sen la komploto, ĉar esence ne temas pri la mono kaj la potenco, kiel opinias teoriistoj de la komploto. La vero estas multe pli terura: malantaŭ ĉiu malbono, kiun ni trovas kaj travivas en la mondo, staras infera malamo kaj pereiga malamo de demonoj kaj ilia Ĉefulo, kiu sin ĉiam pli ofte prezentas kiel mastro de la mondo kaj la homo, ĉar ĉiu peko, kiun ni allasas, al li donas al tio rajtigon.

Tiuj eldiraĵoj certe transpaŝas komprenpovon de pure rationale kaj materiisme orientiĝintaj teknokratoj (Platono ilin nomas snoboj), sed sufiĉas ĉirkaŭrigardi la mondon: tio, kio konstante okazadas dum lastaj jarcentoj en la mondo en kreskanta skalo, ne estas eble sen ekzisto de la diablo ekkompreni.

La malbono estas forto, sed ankaŭ mem en si terura abismo kaj ne eblas ĝin per iuj raciaj motivoj pravigi.

Kial Dio ne intervenas?

Dio intervenis kaj konstante intervenas, sed ankaŭ Li respektas la liberan volon de la homo, Li intervenas antaŭ ĉio per tio, ke li

senĉese avertas. La Salette, Lurdo, Fatimo, Akita, sed la homo ne volas aŭdi, principe li ne volas pripensi sian konduton kaj ĝin ŝanĝi. Male, li fariĝas ĉiam pli radikala, ĉiam pli rifuzema. Li opinias, ke li kapablas sin mem savi per ekonomia, sociala kaj scienca progresoj, kaj ĝuste ĉe tio li konstante ripetadas la heredan pekon. Kaj per tio li ĉiam pli foriras de Dio kaj de lia dekalogo. Eĉ ne la teruroj de la du mondmilitoj, teroro de nacionalismo, rasisma kaj socialklasa malamo, kiu enpelis tutajn naciojn en pereigajn barakojn, eĉ ne atombombo, eĉ ne Ĉernobil lin alkondukis al la saĝo. Max Thürkauf priskribas principon de la moderna progresado kaj sciencista frenezeco tute klare: Moderna naturscienco estas tagon post tago pli sencela kaj sensenca, ĉar ĝi sin opinias kiel liberan de valorecoj. Antaŭĉie kiel liberan de moraletikaj valorecoj kaj ankaŭ kiel liberan de la plej altaj valorecoj, de la amo kaj Dio. Sed ĝi ne estas liberigita de la valorecoj, ĉar eĉ libereco de la valorecoj estas valoreco. Liberigi sin de la amo signifas liberigi sin de Dio. Temas pri la valoreco forkonfesi ĉiujn valorecojn. Senco de la suferado estas la amo en Dia mistero de la falinta kreitaro, en kiu neniu amo estas sen la sufero. En materialismo estas suferantoj senvaloraj, en kristanismo estas la plej valoregaj homoj. Tiel granda estas diferenco inter nura medicino kaj vera kuracisto. La suferantoj en la kristanismo estas tial tiel valoregaj homoj, ĉar ili estas pro siaj ofero kaj suferado la plej proksimaj sekvantoj de Kristo, kiu per sia suferado savis la homaron.

„Amu, kaj faru, kion vi volas,“ diris la sankta Aŭgusteno. Tiun unuan parton de tiu devizo materialismo ellasis. Sen la amo estas ĉio sensencaĵo, en la sanitara scienco. Tiel ĝi fariĝos nura medicino. Ne mankas kapoj, sed koroj. La kapo estas tenujo de fiereco, la koro estas tenujo de multe pli granda kuraĝo, kuraĝo al la humileco. La humileco estas Dia timosento, ne la timo pro la homo. La fiereco estas la timo pro la homo (pro ka-

riero) kaj ne la Dia timosento...

Kio temas pri la senvaloreca moderna scienco, kiu komprenas senvalorecon kiel liberiĝon de Dio kaj liaj leĝoj dum sciencaj esploroj kaj pelatingis scienccon al nuntempa ateisma strebado, pri tio diris la sankta Hildegarda terurajn frazojn: „La homoj, kiuj rigardas la estulojn kiel la libron por lego kaj samtempe ili volus el tiu libro ion ellegi, adoras anstataŭ Dion la diablon. Al li ili servas, kaj tial li sin starigas iliaflanken kaj diras: »Kion vi de mi deziras, tion mi al vi donos!« Kaj tial asertas bedaŭrindulo, kiu per tio nur al la diablo servas, al si mem: »Mi trovas mian savon en la naturo. Se mi do rigardus nur la Dion sen alproprigi al si tiujn bonojn, povus al mi Dio ĉion, kion mi havas, laŭ lia plaĉo, forpreni. Kaj kion mi poste havus? Tial mi klopodas esplortrovi en la mondo ĉion, kion mi volas. Ke mi per tio povus min ŝarĝi per kulpo, por tio mi ne havas komprenon!« Tiel parolas al si tiu, kiu per tute malbona maniero sin opinias frenezulo kaj tiel li ankaŭ praktikadas sian renversitan scipovon. Tial li estos pereigita je la korpo kaj eĉ je la spirito, ĉar li sekvas falon de la unua anĝelo, kiam li enmetas sian fidon en la senprudantan kreitaron. Se li sin per siaj malĝustaj esploraj metodoj orientiĝas nur je la naturo, estingiĝas vidpovon de sia propra animo. Kaj ĉar li sin dediĉas al malbona, renversita kaj nenien kondukanta agado kaj al ĉio, kio estas kontraŭ la naturo kaj la savo de la homo, sendas sian animon en pereon.“

Simile tute klarajn avertojn de Hildegarda el Bingen, kiujn ĉi tie prezentas Max Thürkauf, oni trovas ankaŭ ĉe sankta Bonaventura, Majstro Eckhart kaj multaj pluaj. Dum multaj jarcentoj ili estis ignorataj. En iuj rondoj hodiaŭ surbaze de vortoj *Submetu la teron al vi* (Gen 1,28) oni riproĉas al la kristanismo, ke ĝi estas responsa pri la naturscienco kaj pri ekzistanta neniigado de la naturo. Nenio estas pli mensogega, ĉar nur la revolucia homo de la modernismo en sia manio de ĉiopoveco senigis la mondon

de ĝia vera signifo kaj disvolvis sian teknologian kredon je progreso.

Tiu ĉi frenezeco plu progresas, ne nur en la atoma ekonomio. La similaj aferoj endanĝerigas nin fare de urania municio dissemita en la tuta mondo (eksa Jugoslavio, Irako, Afhanistano), sed ankaŭ fare de genetika tekniko, nanotekniko, demografia katastrofo, transhumanismo, „gender“-frenezeco kaj en nelasta vivo fare de mondregantaj ambicioj de ĉiuj eblaj krimuloj kaj krimecaj organizaĵoj kaj ŝtatoj. Ekzistas ĉi tie sopiro starigi novan tutmondan sistemon tute sen Kristo. Tiucele estis elvokitaj ĉiuj revolucioj de la lastaj jarcentoj, inkluzive de du mondmilitoj.

Sed ni povas esti certaj: Dio senage ne spektos ĝisfine, li ne permesos, ke la homoj konstruu konstante novajn kaj pli altajn babilonajn turojn de la kontraŭkristanisma ĉiopotenca fernezeco. La babilonaj turoj devos fali, tre baldaŭ! Tio signifas ankoraŭ pli frue, ol la homoj provos tute likvidi Dion kaj kaŭzi nekorekteblajn aferojn. Ne plu ĉi tie estas filozofia fono, estas nur pli malpli klara, pri kio temas: manipulado per atoma fajro, precipe per produktado de plutonio ne estas nur riska scienca eksperimento, sed ĝi prezentas la homan atakon kontraŭ tio la plej esenca. Dio fondis mondordon sur solidaj fundamentoj. Kun nuklea teknologio same kiel kun genteknologio la homo provas fari ne nur ion, kio kontraŭstaras al Dia ordo, li provas ruinigi mem la fundamentojn de la ordo kaj realeco volante ŝanĝi gravajn pilierojn de la ekzistado de la objektoj kaj vivestuloj.

Krizo de la scienco

Per atomenergiaj elektrejoj, bomboj kaj urania armilo enportas la homo en la medion neregeblajn kaj ĝenerale pereigajn elementojn, kiuj atakas la vivon ne nur por unu jarcento, sed por tutaj jarmiloj.

Max Thürkau: „Tiu, kiu opinias, ke la mondo estas nenio alia ol fizikkemia sis-

temo, ŝanĝas la mondon – hejmon de la vivo – je ekskluzive fizika kaj kemia sistemo: je la morta mondo. La rimedon al tio al li disponigis scienco per sia sensenca ago: doni en la manon de la potenculoj la atoman bombon.“

La giganta industrio, kontraŭ ĝia potenco estas ŝajne la plej potencaj politikistoj nuraj pupoj, staras antaŭ plano trakonstrui la tutan produktadon de la ŝtatoj je genetike manipulant materialo kaj monopoli produktadon de la manĝovaroj. Dume el tiu tekniko eliradas simile danĝeraj potencioj kiel el atoma tekniko. Neniu scias kaj neniu povas scii, kiamaniere sin tenos mikroboj, bakterioj kaj virusoj, kiuj ekzistas ĉie, kie estas la vivo, kiel ili akceptos la artefarite produktitan biologian heredaĵon, tiel do povas ekesti damaĝantaj vivformoj kapablaj elvoki tute nekonatajn malsanojn.

Oni evoluigas novajn armilojn, influigas grandparte veteron, ŝanĝon de la klimato. Dum la sciencistoj diskutas pri la eblecoj, kiujn ili jam kelkajn jarojn realigas, ili venenigas la homon eĉ medion. Kiajn flankajn efikojn tio kaŭzos en longedaŭraj sekvoj?

Kaj entuta financa mastrumado en sia avideco intencas el ĉiuj homoj fari enŝuldigitajn sklavojn kaj per neretenebla bankroto elvoki tutmondan ekonomian krizon de nevideblaj konsekvencoj. La ŝtato faras el la mondo grandan malliberejon, en kiu estas permesita kiu ajn amuzado, sed en kiu estas malpermesita kio ajn, kio havas iun rilaton al la vero kaj la Dio.

La mondo forviŝadas Kriston

Kaj kio estas la plej malbona: per subpremado de la kristanismo estas likvidataj spiritaĵoj kaj radikoj de la civilizacio, pieco kaj homeco. La homoj estas enfermataj en la opinion, kiu ne plu allasas supernaturecon, en la kalkulon, kiu ne plu kalkulas kun Dio, kaj tiel la tuta mondo niveliĝas je nura funkcionaleco, kiu enpuŝas

tutan fidon en produktadon kaj konsumadon. Tio okazas pere de malpermeso de pripensado kaj ankoraŭ pli pere de renversado de la realeco. Kleriĝo, kulturo, libereco kaj proksimula amo povas disfloradi nur tie, kie po-vis dum la jarcentoj efikadi en la nacio la Dia graco. La moderna politike senriproĉa konsumisma homaro malhavas kiun ajn spiriton kaj disfalas en frenezecan malestimadon de la kristanismo, do de sia propra bazo.


Ni scias: La Dio povus, se la homoj Lin sincere petus, ĉesigi ĉi ĉion dum unu sekundo. Sed kiam iu el la potenculoj, kiuj sentas sin esti vokitaj regi super la nacioj, preĝadoris Dian potencon kaj petis por la homoj Dian gracon?

Neniam! Ĝuste male: La mondo ne plu volas sian Sinjoron akceptadi. La mondo de politiko, scienco, medioj kaj ekonomio estas blindigita, malmolkora, estanta en la malbono.

Ni rikoltas rikoltaĵojn de la pekoj de la lastaj jarcentoj.

Malpleneco kiel konsekvenco de la forŝiro de la sencopleneco en la spirita sfero tiel iĝis realeco. Kaj kio estas la realeco? La realeco estas ĉeesto de la vero. Kie ne estas vero, restas la realeco nur kiel restaĵo de iam valida vero, ni vivas kvazaŭ el aromo de malplenigita botelo, kiel trafe diris Erik Maria Ritter. Sekve de la pekeca forŝiriĝo de la senco de ekzistado estas la estanteco forŝirita de la vero kaj ĝi fariĝas iluzio destinita al disfalo. Ĉiuj la supre menciitaj negativaj fenomenoj estas la fenomenoj de unu fundamenta fenomeno, kaj ĝi estas rifuzo de Kristo, kiu estas pratipo kaj la vero. La rifuzo de Kristo fariĝas suferado de la nuntempo. Perdo de Logoso alportas kun si tiun prometean nelimigitecon, kiu laŭ sankta Paŭlo kondukas al la homo de senleĝeco. ■

Transprenita el Kirchliche Unschau 5/2011



Babelturo - pentraĵo de Pieter Bruegel el la jaro 1563